

Liveraĵo - Instruista trejnado

Cyprien GUIYA
SZILVA Szabolcs

17.04.2017 Castione della Personalà
Tempodaŭro: 150 - 200 min. (sen paŭzo)

1. Enkonduko: instruado

a. Kio estas Instrui? (laŭ PIV - Plena Ilustrita Vortaro)

- Transdoni al iu metodajn sciojn pri iu fako de la scienco, literaturo k.a.
- Lertigi iun pri arto, okupo, teniĝo ks.
- Precize montri al iu, kiel li/ŝi devas agi:

b. Kia estas bona instruisto: pozitiva, pacienca, klara, atentema, organizita, preta mem lerni, afabla, bone vestita(?)

Tasko 1: La instruisto unue demandas kia estas bona instruisto. Ĉiu individue devas skribi kelkajn pensojn sur paperon kaj poste la tuta grupo preparolos. La plej taŭgajn respondojn la instruisto algluas al la muro sub la surskribon "Bona instruisto".

c. Kia estas bona E-instruisto: tiuj ecoj de "bona instruisto" plus:

- + bone regas Esperanton
- + konas multajn kulturojn (scipovi instrui internacian grupon)
- + estas tolerema kaj aprta
- + iomete almenaŭ konas kelkajn aliajn lingvojn

Tasko 2: La instruisto demandas kiuajn aldonajn ecojn devas havi bona E-instruisto. Estas grupa laboro. La plej taŭgajn respondojn la instruisto algluas al la muro sub la surskribon "Bona E-instruisto".

d. Kiuj estas la bezonataj aĵoj dum instrui: (en ordo laŭ bezonateco: klasĉambro, seĝoj, tablo, skribiloj, paperoj, tabulo, komputilo, laŭtparoliloj, projekciilo.

Tasko 3: La instruisto demandas kiuj estas la bezonataĵoj por instrui. Estas grupa laboro. Ĉiu grupo devas krei liston de bezonataĵoj de la plej bezonata aĵo, ĝis la malplej bezonata. Poste la grupo pridiskutas tion kaj la instruisto algluas al la muro la respondojn laŭvice sub la surskribon "Bekonataĵoj".

2. Tipoj de lernantoj:

Tasko: Ĉiu skribu sur paperpecon po unu manieron, per kiu li/ŝi lernas plej efike (ekz-e legante tekston, aŭskultante muzikon ktp.)

- vida: ili preferas vidi kaj videbligi la konektojn inter la rilataĵoj
en la praktiko tio signifas: uzo de grafikaĵoj, tabeloj, figuroj ktp.
- aŭda: ili ŝatas ripeti la aŭditajn aferojn
en la praktiko ili ŝatas ekz-e aŭdi demandojn kaj laŭte respondi ilin
- praktikema ili kunligas siajn sentojn, ĉar preferas lerni per praktikado
en la praktiko ili ŝatas moviĝi dum lernado, ili ŝatas sperti, travivi kaj eksperimenti (ekz-e rolludoj), ili ŝatas ankaŭ skribi kaj skribi denove por pli bone memori

Tasko: La instruisto algluu tri paperfoliojn al la muro: aŭda, vida, praktikema. La trejnatoj sur paperetojn skribu kiumaniere ili lernas plej efike, ekz-e: lerni vortojn per multfoja reskribado/

kopiado. Ili allgluu siajn paperetojn sur la muron al la lernantotipo, pri kiu ili pensas, ke la maniero priskribita sur la papereto plej taŭgas. La paperetojn eblas glui ankaŭ inter du aŭ tri lernantotipojn kaze de ne-kapablo decidi al kiu grupo apartenas la konkreta maniero. La trejnisto tralegas kelkajn.

3. Komunikado

1. Kio estas komunikado: interŝanĝo de informoj inter du aŭ pli da homoj
2. Manieroj de komunikado:
 - Vorta: buŝa, skriba
 - Nevorta komunikado: okulkontakto, korpopozicio, gestoj, korpomovo, tono de la voĉo, tuŝo

4. Instrumetodoj:

Metodo estas:

- agoj de la instruisto (prezentmaniero, instruteknikoj)
 - uzado de materialoj (nur parolo, libro, laŭtparolilo, projekciilo)
 - formo de kunlaboro (individua, para, grupa, klasa)
- a) rekta:
- celo: oni lernu la fremdan lingvon kiel la gepatran: nature, parole, imite, ne pere de alia lingvo
 - oni ne uzas tradukon
 - grava Esperanta rekt-metodisto: Andreo Cseh (li ekuzis tiun ĉi metodon al Esperanto)
 - tio taŭgas ĉefe por aŭduloj kaj praktikemuloj
- b) fizika:
- tutsensa fizika reago: ligo inter la fizika ago kaj la memoro
 - taŭgas ĉefe por praktikemuloj
- c) gramatika-traduka:
- la plej baza kaj plej malnova lernometodo
 - baziĝas je instruado de gramatiko kaj farado de gramatikaj taskoj, multe da tradukado
 - instruado de laŭorda pensado dum uzo de la lingvo
 - por Esperanto eble la plej taŭga metodo en unulingva grupo → Ja kial ne eluzi la gramatikan simplecon de Esperanto dum la instruado?
 - bona por viduloj
- d) parola:
- celo: la parolata lingvo
 - ekzercoj baziĝas je aŭskultado kaj parolado, ripetado
 - ĉefe: aŭduloj
- e) aŭd-vida:
- uzas multajn sensojn: aŭdado, vidado, skribado, kompreno, parolado
 - taŭgas por ĉiuj tipoj de lernanto

Tasko 1: La lernantoj decidu pri la konkreta metodo, al kiu tipo de lernanto ĝi plej taŭgas.

Tasko 2: La instruisto kreas 5 grupojn kaj ĉiu grupo ricevas po unu instrumetodon (se estas tro malmulte da homoj, ni povas havi 4, 3 aŭ 2 grupojn kaj tiukaze ni prezentos malpli da

instrumetodoj pere de ekzemplo). La unua tasko de la trejnatoj estas priskribi la avantaĝojn kaj la malavantaĝojn de la konkreta metodo. Poste ili prezentos. Post la prezentoj la instruisto disigas la avantaĝojn kaj malavantaĝojn de facilaĵoj kaj malfacilaĵoj kaj aparte mencias ilin.

	rekta	fizika	gramatika-traduka	parola	aŭd-vida
facilaĵoj	- kapto de intereso - teno de atento	- pretiĝo	- pretiĝi	- malmulte da laboro dum la leciono	- la instruisto povas dume ripozi (io/iu alia klarigas dum ioma tempo) - ne estas tempoperdo
malf.	- malfacilas prepariĝi	- internacia grupo: konfuziĝo: la instruisto devas bone pretiĝi	x	- multe da prepariĝo (kaze de ne-parolema grupo)	- multe por klarigi - multe da prepariĝo
avantaĝoj	- ne okazas krokodilado - efika lernado - rapida encerbigado - devo de lernado - tuja ekparolo	- oni atentigas - kreskas la energinivelo - facila memorado	- rapida kaj bona komprenado	- rapida progreso en parolo kaj kompreno	- facilas rememori (uzatas ĉiuj sensoj: vido, aŭdado, parolo kaj skribo) - tre efika
mala.	- ebleco de ne-kompreno, miskompreno aŭ konfuziĝo	- oni ne povas instrui ĉion ĉi-metode	- ebleco de ne-atento, enuiĝo, "endormiĝo" - malrapida metodo por memorado - pezaj taskoj - por EO taŭga: kial ne eluzi la facilecon de EO?	- malrapida progreso en skribado kaj legado	- multe da bezonataĵoj - teĥniko ĉiam povas fuŝiĝi

Tasko 2: Rolludo: Estos unu instruisto, la aliaj estos lernantoj. Ĉiu grupo ricevas unu eron de Esperanta gramatiko/vorgrupo, kiun ili devas instrui per la antaŭe jam ricevita metodo. Post prepariĝo la trejnatoj prezentu. La tuta trejnataro kun la instruisto priparolas la konkludojn.

Konkludo: ne estas "unu bona metodo": oni povasi kombini ilin; ili dependas de multaj faktoroj: celo, grupo, lernantotipoj ktp.

5. Lecionplano:

a) La enkonduka parto konsistas el:

- Detaloj de la lecionoj (Instruanto, lernejo, dato, tempodaŭro, temo ks.)
- Indiko de la nivelo
- Priskribo de la celo(j)
- Uzota lernomaterialo

b) La tempoplano (tabelo) enhavas:

- taskoj (nomo de la tasko)
- instrumaterialoj

- laborformo, taskopriskribo
- didaktikaj principoj (kiujn didaktikajn celojn ni volas atingi en la koncerna parto)
- bezonataĵoj (kiel ekz-e: skribilo por ĉiuj, tabulo ks.)
- Tempo-daŭro

Tasko: Post la prezento la lernantoj ricevas preskaŭ tute malplenan tempoplanon kun malplenaj lokoj kaj aparte la erojn de la tempoplano eltranĉitajn. Ilia tasko estas rekunmeti la lecionplanon. Estas grupa laboro. Por plifaciligi la korektecon de la respondoj, la instruisto disdonos la antaŭe elprintitan pretan lecionplanon por ke la trejnatoj mem kontroli ĉu ili bone faris.

Bibliografio

KOVÁTS, K. (red) (2009): Manlibro pri instruado de Esperanto, Espero / ILEI - Partizánske / Hago

SAT (2005): Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto, Parizo

Wennergren, B.: Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko. <http://www.berilow.com/pmeg>